

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO- INSTITUTO

Nr 52 Aprilo 2004

Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio

Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758 (Bardhyl , sekretario); +355 4 363360 (Rita , kasistino)

Rete: pistolii@email.com (Vasil Pistoli); selimib@albmail.com (Bardhyl Selimi); adoci@gmx.de (Artur Doçi) ; shhasani@albmail.com (Shaban Hasani); hamotto@aul.com.al (Martha Otto) ; beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj) ; matildasokoli@yahoo.com (Matilda Sokoli); a_myrazi@yahoo.com (Ariel Myrazi); sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita Përmeti); dorian77@hotmail.com ; (mgumeni@lincoln.org.al (Jon Gumeni); hysaerald@yahoo.it (Erald Hysa); ereid@wp.pl (Ereid Dhimitri); dritanxhindole@hotmail.com (Dritan Xhindole); ervincanga@yahoo.com

Retpag'o : <http://www.esperantio.tk>

You can access the group's web features using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/>

You can access the group's Management page using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/manage>

La enhavo de tiu c'i numero

El nia E-movado:

Disvolvig'o de Esperanto en Shkoder,
Esperanto centjara multloke.

Pagis la kotizon 2004 :

Kotizoj enlandaj,
UEA kotizoj

Niaj revuoj:

La enhavo de IPR 1/2004

Studsesejoj :

BUS en Pollando

Aktivecoj internaciaj :

Seminario "Eu'ropa Amikeco" en Strasburgo

Esperanto-libroj :

Opinioj pri "Vojag'o en Esperanto-lando"

Novaj'oj:

Esperanto Britain Newsletter

Humoro :

Anekdotoj

El la diplomalaboraj'oj de niaj gestudentoj:

Suda Albanio de Faela Mezzini

El nia E-movado

Disvolvigo de Esperanto-lingvo en Shkoder

Volapuk, Latino sine fleksion, Esperanto, Ido, Universal, estas nur kelkaj el 300 projektoj faritaj dum pasintaj jarcentoj por enkonduki en uzado komunan lingvon. El tiuj planitaj lingvoj, nur la internacia lingvo konata per la nomo "Esperanto" sukcesis laŭ la nombro de adeptoj kaj laŭ la transpaso de g'io de generacio al generacio, rezisti al la tempo kaj resti digna, dum pli ol 100 jaroj.

En multaj landoj, la uzado de la lingvo Esperanto estas malhelpita kaj konstruistigita dum multaj jaroj (en Sovetunio, Germanio, Hispanio, Portugalio, Albanio ka). Maurice Genovix, ĝenerala sekretario de la Akademio de la Franca Lingvo, estas esprimita pri la lingvo Esperanto tiamaniere: "Esperanto estas kapabla por esprimi la plej fajnajn nuancojn de ideoj kaj sentoj. Tiel tiu ĉi lingvo povas esprimi ideojn konforme al la perfektaj beletraj estetikaj demandoj. La lingvo kontentigas la plej obstinan kaj suspektaman intelekton".

Ĉar Esperanto ĉe ni estas malmulte konata ni starigas la demandon: Kio estas Esperanto? Tiu ĉi lingvo formig'is sur la fundamentoj de indoeŭropaj, aziaj kaj afrikaj lingvoj. Ludoviko Zamenhof, publikiginta en la jaro 1887 en Varsovio la unuan projekton de tiu ĉi lingvo, estas substrekinta ke g'io celas ne la anstataŭigon de la naciaj lingvoj. Ankaŭ la nuntempaj esperantistoj havas saman opinion.

Esperanto povas lernati pli facile ol iu ajn alia lingvo. Tiu lingvo legig'as tiel kiel g'io skribatas. La prononcaj reguloj estas fiksaĵoj. La gramatiko bazig'as sur 16 reguloj; g'io ne havas esceptojn. La lingvo Esperanto aperis en Shkoder 20 jarojn post g'ia kreigo.

(Ĉerpita el prelegaro de Simpozio "Shkoder dum jarcentoj, okazinta en la jaro 1993 en Shkoder, prelego de s-ro Zef Mjeda, Honora membro de UEA)

Esperanto centjara multloke

Kvankam 116-jara (117 meze de ĉi tiu jaro), Esperanto farighas pli kaj pli ofte centjara en iu difinita urbo, aŭ regiono aŭ departemento aŭ distrikto, depende de la administra disdivido de la landoj. Pasintjare ĝi farighis 100-jara en la franca departemento Vendée (Vendeo), pli precize en la urbo Luçon, en Svisio, kaj tute certe en multaj aliaj lokoj aŭ teritorioj tra la mondo. Ĉi jare, en Francio, almenaŭ du urboj estas koncernataj: Angers, en la departemento Maine-et-Loire (nordoriente de Vendeo) kaj Saint-Étienne, en la departemento Loire. En tiaj kazoj, eblas ankaŭ reliefigi la aperon de Esperanto en la tuta departemento por ke ties loĝantaro sentu sin koncernata. Serĉadoj montris efektive ke Esperanto faris siajn unuajn pashojn en 1904 en tiuj departementoj. La nuna periodo estas tre favora al tia datrevena festado, kiu ebligas rilati kun la aŭtoritatoj kaj la amasinformiloj kaj tiel montri ke la Internacia lingvo plue vivas kaj eĉ viglas. Tio aldonighas al multaj aliaj informoj, kiuj konfirmas kreskon de la intereso kaj iniciatemo ĉirkaŭ Esperanto.

Pri Esperanto en SAINT-ÉTIENNE (Loire) :
de PIERRE GROLLEMUND nome de la Klubo ESPERANTO de SAINT ETIENNE :
en tiu jaro 2004, nia klubo festos sian cent-jaran ekziston ! esperantistoj aktivis en nia urbo
de sud-orienta Francio, de la jaro 1904 (almenaŭ !) kiel pruvas dokumentoj kaj arkivoj

niaj. Kvankam ni estas iom malfortaj kaj ne sufiĉe nombraj, ni intencas uzi nian asocian historion por substreki la rolon de la LINGVO INTERNACIA, ekzemple okaze de ekspozicio : por tiu ekspozicio, ni petas al kiuj ajn esperantistoj kaj kluboj (de la mondo !!) sendi al ni, ĉu belajn pos^t-kartojn de sia urbo aŭ lando, ĉu ret-mesag^ojn kun bildoj ! Antaŭdankon ! la utilaj adresoj :
 CLUB ESPERANTO de SAINT ETIENNE
 5 rue des Teinturiers, FR-42000 SAINT ETIENNE FRANCIO
verdapigo@yahoo.fr

Informis Henri Masson

Pagis la kotizon por 2004

Kotizoj enlandaj

Shaban Hasani 1000 lekoj (200 +800)
 Nehat Sokoli 200 Leko
 Bardhyl Selimi 200 Leko

UEA kotizoj por Albanio

Vershajne vi jam konstatis, ke la tabelo de UEA-kotizoj por 2004, aperinta en la oktobra numero de la revuo Esperanto estas neghisdatigita kotizotabelo - tiu por 2003. Kompreneble, se iu tiom anticipe pagis por 2004 laŭ la malnova kotizotabelo, ne estas problemoj. La pago validas. La ĝusta kotizotabelo por la jaro 2004 aperis en la faldfolio enmetita en la novembran kajeron de la revuo. Por via oportuneco ni shatus prezenti al vi la ĝustajn kotizojn por via lando Albanio ankaŭ per retrospito:

KOTIZ-TABELO	2004	por	Albanio:
MG	-	5	EUR
MJ	-	11	EUR
MA kaj MA(T)	-	27	EUR
DMJ	-	275	EUR
DM	-	675	EUR

* Klarigoj

MG - Individua membro, kiu ricevas nur la Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ - Individua membro, kiu ricevas la Jarlibron

MA - Individua membro, kiu ricevas la Jarlibron kaj la revuon Esperanto

MA(T) - Individua membro sub 30 jaroj, kiu ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto kaj

revuojn de TEJO

DMJ - Dumviva membro, kiu ricevas dumvive la Jarlibron

DM - Dumviva membro, kiu ricevas dumvive la Jarlibron kaj la revuon Esperanto

Char en via lando ne estas UEA-peranto, vi estas invitata pagi rekte al UEA al unu el la

kontoj: ABN-Amro Bank, Postbus 949, 3000 DD Rotterdam (konto: 42.60.51.599)

(aldonante 7 eurojn). Banko MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto:

25.52.89.804 per poshtmandato al Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo.

per cheko favore al UEA (aldonante 10 eurojn por la bankkostoj).

per kreditkardoj: Visa, Amex, Mastercard, JCB, Access, Carte Bleue

al la poshtchekkonto de UEA en:

Belgio 000-1631831-97

Germanio 3182 91 509 BLZ 370 100 50 Koln

Svedio
Svislando
Via,
Centra Oficejo de UEA

12-2310-0

74374-0
Bulle

Noto: Ni komprenas bone ke indas kaj endas pagi ankau' albanoj –por alig'i al UEA. Sed ni devas memori kaj atentigi niajn eksterlandajn samideanojn, ke la nivelo de pagoj en nia lando estas ankoraŭ terure malalta. Vidu supre, nia enlanda kotizo estas 200 lekoj aŭ iom pli ol unu eu'ro. La salajroj averag'aj estas ĉirkaŭ 100 eu'roj monate, dum la pensioj sufiĉe malpli. (La prezoj estas same kiel en Italio!) Oni postulas de ni pagi 11-27 eu'roj kio signifus egalvaloron de kelkaj taglaboroj. Kion pensus samideanoj el Italio najbara ekzemple, se oni postulus de ili pagi, ni diru, 300 eu'roj por la kotizo al UEA? Do, ni nur povas diri ke la kotizoj por UEA, ILEI, TEJO ktp por albanoj estas ankoraŭ luksaj'o.

Vasil Pistoli

Niaj revuoj

La enhavo de IPR, 1/2004

Stefan MACGILL: Plumira

La Estraro kunsidis en Beogrado, La Komitato vocxdonas (A. ORELLANA ROJAS)

Katja IGNATIEVA: Interkultura lernado kaj edukado: bezono kaj defio

Forpasis BOOME (anstataŭ nekrologo)

Hokan LUNDBERG: Flugiloj de Malfacila Vento

Bardhyl SELIMI: La distra momento dum la lecionhoro de matematiko (I-a p.)

LIU Xiaojun: Kiel mi instruas tempojn kaj participojn al cxinoj (I-a parto)

PETIK János: Pri la instruado de vortoparoj

Katja BODNAROVA: Cxe la tombo de Komenio

El la landoj kaj sekcioj (GB, BG, JP, TG)

Reago (Felix GARCIA BLAZQUEZ)

Konferenco 2004 - informoj, aligxilo (Atilio ORELLANA ROJAS)

Informis Atilio Orellana Royas

Studsiesioj

BUS

en

Pollando

La senato de AIS en Komarno konstatis, ke okazigo de BUS 5 dum 2004 en Pollando (prefere Lublin aŭ Bydgoszcz) estas dezirinda. Estas nun la tasko de la organizantoj varbi la necesajn partoprenantojn, por ke la kondic^oj de BUS estu plenumitaj. Mi alig^as al tiuj varb-klopodoj kaj petas ĉiujn gekolegojn (efektivajn membrojn kaj asociitajn docentojn de AIS) anonci al la organizantoj en Bydgoszcz (stud@esperanto-turismo.com) kaj al la klerigofico (quednau@wzw.tum.de), je kiu tempoperiodo ili povus partopreni la studadsesion, kaj ĉu ili povas eniri ekzamenkomitaton kaj/au oferti kurson en ILo. La kondic^oj por okazigi BUSon estas publikigitaj en la reto: <http://www.ais-sanmarino.org> -> studado -> BUS-regularo La plej malfacile plenumbla punkto estas, ke devas partopreni (kiel ekzamenanto aŭ preleganto) almenaŭ 3 efektivaj membroj, kiuj estas (vic-)senatanoj, (vic-)dekanaj aŭ (vic-)fakarestroj, kaj inter kiuj estu minimume unu (vic-)senatano. Mi mem jam ripete deklaris, ke mi nepre *ne* estos disponebla en aprilo/majo.

Ĉar Bydgoszcz estas la akademia hejmo de la plej granda parto de niaj g[^]isnunaj studentoj, bakalauraj kaj magistroj, mi elkore petas ĉiujn gekolegojn favore konsideri la eblecon, ke li/s[^]i povus kontribui al BUS 5. G[^]is nun anoncis sin al bakalaura ekzameno el Bydgoszcz 15 kandidatoj - inkluzive 2 kandidatinoj el Latvio, kiuj jam finis la studadon en Bydgoszcz (Krome anoncis sin 7 kandidatoj por magistrig[^]o, sed tiuj devas ĉiukaze veni al Komarno)
Esperante pozitivajn respondojn elkore salutas Dieter Quednau

Esperanto en la uragano de ideologioj (Internacia Esperanto- Simpozio en la Aŭstria Nacia Biblioteko)

La 8an kaj la 9an de oktobro 2004 la Aŭstria Nacia Biblioteko en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio organizos simpozion okaze de la Esperanto-jubileoj : la centa datreveno de la naskig^o de Lidia Zamenhov (1904-2004) ka la 75-jarig^o de la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM, aligita al la Aŭstria Nacia biblioteko en 1929).

Prelegos Ilrich Lins (Germanio-Japanio, ĉefpreleganto); Vilmos Benczik (Hungario); Wera kaj detlev Blanke (Germanio); Heiner Etchner (Universitato de Vieno, Aŭstrio); Alex Kafer (Aŭstrio), Herbert Mayer (IEM, Aŭstrio), Claude Piron (Svisio).

La historio de Esperanto kaj la sorto de esperantistoj estas firme ligita al lag^oenerala historia evoluo. Verki historion de esperanto signifas verki kadre de la historio de la mondo. Tion montris Ulrich Lins per “ la dang^oera lingvo. Studo pri persekutoj kontraŭ Esperanto”. Esperanto do ne estas io ekzotika kaj marg^oena, kiel foje opinias la g^oenerala publiko, sed g^oi estas integra parto de historiaj evoluoj.

Tiu fakto estas la elirpunkto de la simpozio, kiu pritraktas la destinon de Esperanto e la politikaj- ideologiaj uraganoj de la pasinta jarcento, fokusante interalie la atenton al la sorto de Lidia Zamenhov (murdita en koncentrejo Treblinka en 1942) kaj de la Internacia Esperanto-Muzeo (fermita en 1938 fare de nazioj). Apud tio pritraktig^os ankaŭ temoj , kiuj tus^oas la nuntempon: Kia estas hodiaŭ la situacio de Esperanto en la mondo? Kiel aspektas la rilato inter Esperantokaj la nunaj politikaj regantoj? Kiel konduku la esperantistoj en mondo, kiu almenaŭ en la publika diskurso ege malfavoras la ideon de artefarita internacia helplingvo, sed aliflanke pere de modernaj teknologioj ofertas novajn eblecojn?

Laborlingvo dum la unua duontago de la simpozio estos la germana por la ne-Esperanta publiko- la cetero disvolvig^os en Esperanto.

Paralele okazos : malfermo de ekspozicio pri la sama temo en la Internacia Esperanto-Muzeo, prezento de la noveldonita plena verkaro de Lidia Zamenhov kaj internacia Cseh-kurso por komencantoj.

(la germana nomo de la arang^o estas : Die gefahrliche Sprache)

Partoprenkotizo : 50 eu^oroj, por studentoj kaj lernantoj 35 eu^oroj. Alig^o: plansprachen@onb.ac.at)

Informis Helga Farukuoye Helga.Farukuoye@ont.ac.at , Hofburg Michaelerkuppel A-1010 Wien Tel +=43 1 53 35 145

Internaciaj aktivecoj

Seminario “Eu^oropa Amikeco” en Strasburgo

S-ino Carola Antskog el Finnlando proponis partoprenigi en ĉi aprila (24-25) Seminario ankaŭ albanajn gejunulojn. Alig^ois Artur Doc^oi kaj Enkelejda Doc^oi , ambau^o aktuale

studentoj en Germanio. Ni klopodis partoprenigi ankaŭ du blindajn junulinojn, nome Anisa Proda kaj Eva Hysa, eklernintaj E lastajn du jarojn, sed estis preskaŭ neeble ĉar, unue ili ne posedis ankoraŭ pasporton kaj sufiĉan monon por vojaĝo, due Matilda Sokoli kiu akompanus ilin rezignis lastmomente de tia tasko malfacila por ŝi. Kiel ajn ni dankas tutkore s-inon carola pro ŝia kunlaboremo kaj helpemo.

Rita Permeti

Niaj libroj

OPINIOJ PRI "VOJAGXO EN ESPERANTO-LANDO"

"Vojagxo en Esperanto-lando" estas certe la plej ricxe ilustrita originala libro en nia eldonhistorio. (Trevor Steele, Gxenerala Direktoro de UEA, verkisto, membro de la Akademio de Esperanto - AUXSTRALIO-NEDERLANDO)

Konkrete mia rolo estis fosi en la fotoarkivo de la CO kaj en malnovaj revuoj kaj libroj por trovi fotojn k.a. ilustrajhojn. La libro estas abunde ilustrita kaj fakte ne ekzistas alia libro por simila celo, kiu povas rivali kun ĝi. Mi estas tre kontenta pri la dezajno de Francisco. Mi nur bedaŭras, ke la libro ne povis aperi jam dum mia oficperiodo... Tamen, la plej grandaj meritoj kaj laudoj apartenas al vi. (Osmo Buller, estinta kaj estonta Gxenerala Direktoro de UEA, iniciatinto de la reeldono kaj ilustra redaktoro de "Vojagxo en Esperanto-lando" - FINNLANDO-NEDERLANDO).

Lia ĵus aperinta "Vojagxo en Esperanto-lando" jam rikoltis multajn laŭdojn kaj pro tio ni ne simple aldonigxos al la vico de la laŭdantoj. La plej interesa eldiro, kiun mi auxdis, estas: "Cxi tiu libro similas normalan libron por lerni fremdajn lingvojn." Alivorte grafike kaj gxeneralaspekte gxi ne multe diferencas de la lernolibroj pri la angla, kiujn oni trovas en la nuntempaj lernejoj. Kaj jam tio estus granda merito... Sed la vera atuto de cxi tiu libro estas, laŭ mi, gxia enhavo. En 26 placxaj lecionoj gxi sukcesas prezenti la landon Esperantujo, ties rolantojn kaj ties kulturon... Mi ne havas sufiĉe fortajn vortojn por rekomendi gxian uzon... (Renato Corsetti, Prezidanto de UEA, sekretario de la Akademio de Esperanto, auxtoro de lernolibroj - ITALIO)

La libro estas bona referencaĵo por prepari sin al la meznivela internacia ekzameno de ILEI/UEA. (LEE Chong-Yeong, vic-prezidanto de UEA - KOREIO)

Mi deziras al cxiuj legantoj kaj studantoj agrablan vojaĝxon en nia mirinda Esperantujo kun la kompetenta cxicxerono, Boris Kolker. (Kep Enderby, eksa Prezidanto kaj nuna komitatano de UEA - AUXSTRALIO)

Mi nun ankoraŭ kun pli da vervo informos pri via libro. (Gregoire Maertens, eksa Prezidanto kaj nuna komitatano de UEA - BELGIO)

Mi planas uzigi la "Vojagxon" por dauxriga E-kurso en Somera Esperanto-Lernejo en Cxaxak, Serbio, 2003.06.23 - 2003.06.30 (SELCx-2003)... Gxi estas celita al pliamasigo

kaj kvalit-altigo de E-instruado. Instruado pri E-kulturo havas esencan rolon por tiu celo. Pro tia enhavo kaj ceteraj kvalitoj, via libro estas tre tauxga por SELCx-2003. (Radojica Petrovic', prezidanto de ILEI, komitatano de UEA - SERBIO)

Mi vere gratulas vin por tia granda faro! Mi gxojos en Fortalezo iri al la lancxo de via libro kaj tuj acxeti miajn tri ekzemplerojn. (Geraldo Mattos, poeto, auxtoro de lernolibro, Prezidanto de la Akademio de Esperanto - BRAZILO)

Mi lastatempe foliumis kaj grandparte legis "Vojagho en Esperanto-lando", kaj mi estas tre impresita. Ghi estas ekstreme rekomendinda lernolibro por kursoj por progres(eg)intoj. Tre ambicia, kaj tre bona. Gratulojn al Boris! (Bertilo Wennergren, auctoro de PMEG, Direktoro de la Sekcio pri la Ghenerala Vortaro en la Akademio de Esperanto - GERMANIO-SVEDIO)

Ni komencu per mallauxdo: libro tro bona. Tro bona kompare kun la meza nivelo de la personoj, kiuj uzos gxin... Redakte, la libro prezentigxas kiel kolekto de 26 lecionoj de serioza triagrada kurso en imagita modela klubo, kien venas kaj parolas gastoj, jen movade elstaraj, jen malpli konataj sed egale interesaj. Cxiu leciono havas literaturajxon, movadan eron, internacian kulturon kaj - kiel povus esti aliamaniere dum kurso? - detalan komenton kaj lingvajn ekzercojn, prezentitajn tre lerte kaj tute malenue. Ne nur la kursanoj lernos multegon el gxi, sed certe ankaux la kursestro: se duan mallaudon mi faru, cxiu linio estas tiom informoricxa, tiel ke nur unu lego ne sufixas por czerpi plene el tia ricxeco. (Carlo Minnaja, auxtoro de vortaro, membro de la Akademio de Esperanto - ITALIO)

Boris Kolker eldonis cxe UEA la duan plibonigitan eldonon de la perfektiga kurso de Esperanto, kiu samtempe estas gvidlibro pri la Esperanta kulturo. Ricxe ilustrita, la verko prilumas diversajn aspektojn de Esperantujo... Korajn gratulojn al ilustra redaktoro Osmo Buller kaj grafikisto Francisco Veuthey kiuj dokumentite gvidas nin tra 26 lecionoj de la Esperanta pasinteco kaj la aktuala vivo... Esperantujo en la libro estas cxarme multvizagxa kaj ties kroata parto estas stimula. (Spomenka S^timec, verkistino, auxtoro de lernolibro, membro de la Akademio de Esperanto, komitatano de UEA - KROATIO)

Kial pagi flugbileton? Lege VOJAGXU al Esperanto-lando! (Claude Piron, verkisto, eksa membro de la Akademio de Esperanto - SVISLANDO)

La libro estas nedika, sed neordinare peza (duonkilograma!), cxar presita sur altkvalita papero. Ampleksa kolekto de bildoj pri lokoj, homoj kaj libroj de Esperanto-lando kontribuas al la unikeco de tiu lernolibro-gvidlibro. Salutinda verko, kiu abunde plenumas la promeson de sia subtitolo: "Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo". (Donald BROADRIBB, eksa membro de la Akademio de Esperanto - AUXSTRALIO)

Per cxi tiu libro ecx la plej izolita esperantisto povas gxui la internacian amikecon de Esperantujo. (Debra McCarney -

AUXSTRALIO)

Via libro farigxis studobjekto de nia grupo cxi tie en Melburno. (Franciska Toubale - AUXSTRALIO)

"Vojag^o en Esperanto-lando" estas, laux mi, unu el la plej allog aj kaj interesaj libroj dum la lastaj periodoj. (Marcel Delforge, komitatano de UEA - BELGIO)

Ni simple estas ravitaj pri la ri[^]ceco de via libro, kie vi kapablas kunigi en 300 pa[^]goj la plej signifajn faktojn de nia vasta kulturkoncepto. [^]Car mi esperantumas de pli ol 50 jaroj, unue en Berlino, poste en Torino kaj nun en Brazilo, sen konsideri la internacian vivon en pli ol 30 UK-oj, mi vere rekonas mian vivon de esperantistino en via libro. (Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia - BRAZILO)

Antauxe, mi verkis neniom. Estis vera psika trauxmo, kvazaux tragedio mem. Neverki absolute vundadis mian memamon. Hodiaux, la afero ege sxangxigxis. Mi jam sufcixe verkas por materialigi miajn pensojn. La simpleco de Esperanto, la profundeco de "Vojagxo en Esperanto-lando" kaj la senlima sindedicxo de nia profesoro Boris Kolker sekurece kondukis min gxis akcepteblaj kondicxo por verki. Ververe, estos mia granda revo realigita. (Oswaldo Cabral Franco - BRAZILO)

Via libro ne estas bona. G'i estas boneeeega! Tamen g'ia prezo estas iom alta por la brazilanoj. (Aloisio Sartorato - BRAZILO)

Kiel simpla, senmerita brazilano, mi kore salutas kaj gratulas vin pro tutmonde lauxdata verko, elcxerpita en la libroservo de la kongreso. Mi tuj mendos mian ekzempleron al la libroservo de BEL, antaux ol gxi elcxerpigxos en la tuta mondo! Mi esperas, ke vi denove vizitos nin en Brazilo, kun via entuziasmo kaj simpatio. (Paulo Sergio Viana - BRAZILO)

D-ro Boris Kolker estas ne nur instruisto de la kurso. Li estas ankaux nia cxicxerono, kiu pacience kaj gxentile kondukas nin al niaj malkovroj dum la kurso, montrante al ni cxijuj lokojn kaj historiajxojn de la mirinda Esperanto-lando, kiujn nur veraj esperantistoj povas koni. (Adriana de Oliveira Pavani - - BRAZILO)

Ecx se lauxforme la libro radikas en ioma nostalgio, lauxteme gxi prezentas la kulturon de Esperanto tia, kia gxi estas: vasta, varia, viva... Tamen ne nur perfektigxemuloj vizitu la klubon. Tiuj, ekzemple, kiuj alfrontos ekzamenon de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), en kiu staras kutime sxvitiga sekcio "kulturaj konoj", nun pli trankvile dormos. For la plendoj, ke malhaveblas enkonduka libro pri Esperanto-kulturo! Kaj espereble "Vojagxo en Esperanto-lando" spronos al plia legado, al plia esplorado de la Esperanto-fenomeno. (Paul Gubbins, verkisto, auxtoro de lernolibroj - BRITIO)

Estas prezentitaj bonegaj tekstoj de auxtoroj, kiuj posedas propran, malsaman, sed bonan Esperanto-stilon - klasikuloj de la Esperanta literaturo. Do, en la libro la auxtoro ne

teorias pri tio, kiu estas la bona Esperanto-stilo. Li simple prezentas plurajn modelojn de tia stilo. (Petko Arnaudov, auctoro de lernolibro - BULGARIO)

"Vojagho" estas belega, ne nur el enhavo, ankaŭ el formo. (Liu Haitao - CXINIO)

La lernolibro de Boris Kolker estas bona. En ĝi oni povas legi pri preskaŭ ĉio en Esperantujo. La literatur-ekzemploj estas el la plej legindaj. En DEFA Henning Olsen studas kun ni ĉiun duan lundon. (Jytte Sunekaer - DANIO)

Pri la verkoj kaj verkistoj, eventoj kaj E-historio Kolker cxiam donas bazajn faktojn en la komentarioj, kiuj igas la libron kvazaŭ moderna enciklopedieto pri Esperanto... Ne malgravan rolon ludas la desegnaĵoj de F.L. Veuthey kaj la abundaj fotoj pri Esperanto-eventoj kaj esperantistoj, kiuj igas la lernolibron interesa kaj historia fotoalbumo... Mia opinio, indus uzi la libron kiel bazon por diskutoj en progresema grupo aŭ dum somera kurso. (Raita Pyhala - FINNLANDO)

Boris Kolker meritas varmajn gratulon kaj dankon. En "Kalevala", la finna nacia epopeo, estas belaj vortoj, kiuj esprimas miajn sentojn al la auctoro de la libro "Vojagxo en Esperanto-lando". Jen mi

citas: "Li nun plugis sulkon por kantontoj novaj, skiis sulkon, rompis branĉojn, sarkis suprojn, markis padon. Jen la vojo nun atendas, pado nova pete gestas al kantontoj kompetentaj, al pli bonaj lertaj bardoj inter la gejunularo, kiu nun kaj post li kreskos." - Dankegon! (Jorma Ahomaki - FINNLANDO)

Sed la diamantoj en tiu juvelo gxuste estas la komentarioj pri la tekstoj: renovigitaj, gxisdatigitaj, ili fakte faras el tiu nova eldono tute alian verkon ol la unuan; tio estas vera dua eldono, kaj ne, kiel tro ofte, simpla represo kun detaletaj sxangxoj. Tiu notaro estas ercejo de informoj pri la du kampoj, kie ni, samideanoj, estas plej malkleraj: E-historio kaj E-literaturo; kaj ni ne forgesu, ke popolo, kiu ne konas sian historion nek literaturon, ne reale ekzistas. Tiu verko nun estas LA lernolibro dua-nivela en esperanto, kiu forsendas al paseo cxiujn antauxajn similajxojn... Ni gratulu UEA pro tiu brila eldona sukceso, certe furoronta cxe tiu mirakle cxiam refloranta printempo: novesperantista flauxro. (Jean-Luc Tortel - FRANCIIO)

Bonega perfektiga ilo, kiun mi cxiam rekomendis al la finintoj de la Gerda-retkurso. (Marc Bavant, auctoro de lernolibro - FRANCIIO)

La dua eldono, reviziita kaj konsiderinde plivastigita, farigxis libro nepre por cxiu serioza esperanto-parolanto, kiu dezirus ekzamenigxi pri "Kapableco" (ekzameno de la tria nivelo de la Franca Instituto de Esperanto). Sed cxiu ajn profitos legante gxin trae aŭ malfermante gxin hazarde en diversaj lokoj. Mi rekomendas la libron ankaŭ por perfektigaj kursoj, intensaj stagxoj aŭ plivigliĝo de la kluba vivo: gxi estas bonega helpilo. (Renée Triolle, auctoro de lernolibro, komitatano de UEA - FRANCIIO)

Via VOJAG`O EN ESPERANTO-LANDO estas simple brila: la enhavo; la preskvalito; la paperkvalito; la ilustraĵoj, ĉio - eĉ la ideo krei tian libron - estas lau mi absolute genia. La Esperantistaro dum multaj jaroj vin kore dankos! (Johano Rapley - FRANCIO-BRITIO)

Tralegu tiun belegan libron "Vojagxo en Esperanto-lando". Havu iom da kuragxo kaj libertempo por fari la ekzercojn de la 26 lecionoj. Vi ne bedauros. (Marcel Redon - FRANCIO)

Mi jam uzas la unuan eldonon de "Vojagxo" kaj povas (varme) rekomendi gxin por cxiuj, kiuj volas multe lerni kaj pri la lingvo kaj pri Esperantio. La tekstoj estas tre diversspecaj kaj interesaj. Nun venas la dua eldono. Lauxdire, estas multaj novaj tekstoj. Bravo, mi certe acxetos gxin. Sed precize cxar multaj tekstoj estas novaj, indas acxeti ankaux la unuan! (Franc,ois Bartsch - FRANCIO)

Miaopinie cxiu serioza esperantisto devus havi "Vojagxo"-n. La plej grava merito de la libro, laux mi, estas, ke gxi en mirinda maniero instigas al pliprofundigxo en la Esperantajn kulturon kaj historion. (Dieter Dungert - GERMANIO)

Estante granda ano de via VOJAG'O, mi jam ekscitite atendas la novan eldonon, kaj vaste varbos pri g'i. (Ursula Niesert - GERMANIO)

Jen verko por p e r f e k t i g o de la scio de tiuj, kiuj jam efektive havas la fundamenton, kaj do kiuj havas la eblon kun spirita komforto lasi sin influigxi de la tekstoj elektitaj bone kaj komentitaj bonege... Mi elkore gratulas Borison Kolker: lia evidenta sxato al vere bonaj Esperantaj tekstoj, liaj mondokono, historio-kono, inventemo kaj persista redakta laboro produktis tre bonan, utilan libron. Evidente, mi - kaj aliaj simile - bezonas ankoraux tempon por ekkoni la libron vere bone, kaj por povi gxin analizi lauxmerite kaj por uzadi gxin plensukcese. (Blazio Vaha, verkisto - HUNGARIO)

Amikino pruntedonis al mi vian "Vojagxon" kaj sincere mi diras, ke gxi estis gxua legajxo... La sukceson de la libro brile pruvas, ke jam pretigxas la tria eldono. (Csiszar Ada - HUNGARIO)

Mi sendis ekzempleron de via belega kaj bonega libro al irlanda registara ministro, S-ino Mary Hanafin (konatino de mi dum 25 jaroj, kiu respondecas pri informadiko en Irlando, kaj laboras che nia chefministro). Mi sendis vian libron al shi kiel pruvon ke ekzistas richa E-kulturo. (Sean O' Riain - IRLANDO)

Mi vizitis la hejmpag^on EDUKADO.net kaj renkontis en g^i la komentojn pri via libro. Ili estas fascinaj! La skribintoj parolis tre fervore pri la libro, lau`dante la diversajn facetojn de g^i (enhavo, grafikado ktp). S^ajnas ke, legante iliajn komentojn, oni tuj emas kuri kaj ac^eti la libron... (Josef Shemer, komitatano de UEA - ISRAELO)

Majstroverko. Tre interesa legajho. La kontribuoj enhavaj, inteligentaj, la ekzerca parto stimula; ekz. verkigi la sekvon de la Piron-a rakonto, brila ideo! Senpacience mi atendas la eldonon! (Michela Lipari, estrarano de UEA - ITALIO)

Antauxparole la auxoro B. Kolker diris, ke la devizo de la legantoj estas "Esperanto estu regata samnivele kiel la gepatra lingvo!". Por atingi tiun celon, ni devas serioze plenumi cxiujn ekzercojn, zorge preparitajn kaj metitajn en cxiujn lecionojn. Mi kredas, ke vi atingos sukcese tiun nivelon, se vi diligente kaj pacience luktos kontraux cxiuj ekzercoj auxtodidakte aux grupe. (Cuda Masao - JAPANIO)

En la lasta Esperanto-Festo en Tokio mi prezentis vian libron kaj mi mem uzis ^gin en mia klaso, selektante la ^capitrojn. (Sy^ozi Keiko, komitatano de UEA - JAPANIO)

Mi estas tre felicxa kun via libro. Gxi estas tre interesa, cxar kun gxi mi certe vojaĝas en la historio kaj la mirinda mondo de Esperanto. Mi trovas gxin didaktika kaj agrabla... Mi devas studi kaj legi plu por perfektigi mian Esperanton, kaj via libro estos la plej bona ilo. (Alfonso London~o - KOLOMBIO)

Mi jam pli ol dek du fojojn legis vian libron nomatan "Vojagxo en Esperanto-lando". Tio faris min esperantisto. Kvankam antaux longa tempo mi jam lernis fundamentan gramatikon de Esperanto, mi ne povis scii ideon, kulturon, historion, famajn esperantistojn, gxis mi legis vian libron. Multan dankon al vi pro tio, ke vi verkis tian bonegan libron! (Lee Hyun Hee - KOREIO)

La dua, reredaktita kaj kompletigita eldono de la libro estas vere valora materialo, legenda kaj trastudenda por cxiuj konsciaj esperantistoj, cxu individuaj pluperfektigxemuloj, cxu studentaj en grupoj, kunagantaj en kluboj... Versxajne la nova libro - ni povas diri iusenca "antologia enciklopedio" - de sinjoro Kolker farigxas nepre havenda sur la breto de cxiu kursgvidanto, klubestro kaj konscia esperantisto, apud la naciaj kaj unualingvaj vortaroj kaj plej sxatataj lernolibroj. (Katalin Kovats, auxoro de lernolibro - HUNGARIO-NEDERLANDO)

La verko estas tipografie majstre farita, ricxa je koloroj, fotoj kaj desegnajxo... Se vi sxatas vojaĝadon, literaturon en diversaj kulturoj, tiam mi povas konsili al vi tiun cxi unikan lego-, studo- kaj trarigardindan libron, kiun mi du fojojn kun granda plezuro tralegis. (Jacques Tuinder - NEDERLANDO)

En nia klubo jam 4 personoj ac'etis vian valoregan kaj treege interesan verkon kaj dum la Zamenhofa vespero estis uzata parto el la Verda Biblio el via verko. (Ru Bossong - NEDERLANDO)

Kun pli kaj pli kreskanta admiro mi tralegis vian "Vojagxo en Esperanto-lando". Vere, tiuj, kiuj gxin atente tralegos (aux trastudos, kompreneble), akiros vastan konon pri "Esperanto-lando"! (Wouter Pilger, auxoro de vortaro - NEDERLANDO)

Mi acxetis vian lernolibron "Vojagxo..." Ekde la vintra semestro 2003 mi utiligos gxin en mia esperanto-kurso por la studentoj de la Lublina Politekniko... Mi pensas kaj esperas, ke ankaux ili multe gxuos vian lernolibron, same kiel tio okazis al mi. (Tomasz Chmielik, verkisto - POLLANDO)

Sendube "Vojagxo en Esperanto-lando" de Boris Kolker estas bona bazo por tiuj, kiuj volas senti sin hejme en la tutmonda Esperantio. Ni arde konsilas gxin al tiuj, kiuj timas acxeti esperantlingvajn librojn - en "Vojagxo..." vi nepre trovos ion interesan, cxar gxi konsistas el multaj tekstoj pri diversaj temoj. Krome, cxiu leciono portas fortan emocian efikon. La libro povus esti ankaux plej tauxga esperantajxo por donaci al viaj amikoj, legemaj aux ne tre. Ni "Vojagxu" cxuij kune - kaj jam cxi-somere spertu pli bonan lingvonivelon cxe niaj arangxoj. (Slavik Ivanov kaj Aleksandr Osokin - RUSIO)

La libro, laux mi, meritas esti celo de la vivo. Laux signifo por la irantoj en Esperantolandon kun celo resti ties civitanoj, gxi restos eterne utila. Mi nur bedauxras pro mia partopreno per ne la plej bona mia verko; nu, tiu ne ankoraux estas verkita. Cetere, la 3-an de novembro la klubkunsido en Tihxvina urba E-klubo decidis arangxi ekstran kunvenon cxiumonate speciale por studi la "Vojagxo"-n. Dankon al la auxtoro! (Mikaelo Bronsxejn, verkisto kaj kanzonisto - RUSIO)

La lernolibro estas metodike perfekta, interesa laux enhavo kaj, sendube, tre utila ne nur por progresantoj, sed ankaux por tiuj, kiuj opinias sin "perfekte sidantaj en la lingvo". Pro tio ke gxi enhavas multe da interesaj faktoj pri E-historio kaj literaturo, gxi estos bona helpilo por prepari sin al la supera ekzameno. (Nina Cvileneva - RUSIO)

Tiu cxi libro mirinde tauxgas por tre diversaj progresantoj... Meditante pri legitaj fragmentoj, verkante dauxrigojn, respondante gramatikajn kaj esperant-kulturajn demandojn, oni igxas vera esperantisto! ... Se vi volas gxui legadon, aux prepari vin por ekzamenoj, aux interese arangxi kunvenon, aux perfektigi viajn sciojn, ni rekomendas al vi tiun cxi rimarkindan libron. (Anna kaj Mati Pentus - RUSIO)

Mi kun granda plezuro uzis "Vojagxo"-n kaj opinias gxin plej bona lernolibro. (Igor Lagutenkov - RUSIO)

La libro enhavas tekstojn pri la historio kaj facetoj de nia lingvo (de "Kiel naskigxis Esperanto" plume de la Majstro gxis... sakroj en Esperanto), movadajn temojn (de konsiloj pri la E-kluba agado gxis esperantisma filozofio), E-beletraĵojn, interesajxojn pri landoj kaj moroj. Cxiuj tekstoj estas abunde komentitaj kaj havas ekzercojn. Frandenda libro! (Aleksandro Melnikov - RUSIO)

En tuta mia esp-ista praktiko (ekde la jaro 1971) mi vidis nenion pli bonan en la dubinda kampo de la lernolibro-kreo. Viajn lernilojn oni volas chiam porti kun si, zorge involvi ilin en platan kovrilon por protekti kontraŭ difektigo. Chio chi faras specialan kreivan auron chirkau la fruktodona ellerno de E-o. (Jevgenij Kononenko - RUSIO)

Certe, mi ac'etis vian libron kaj kun granda plezuro kaj intereso legis, legas kaj legos gxin. (Tatjana Rudakova - RUSIO)

"Vojagxo en Esperanto-lando", laux mi, estas unu el la plej gravaj kaj uzeblaj libroj, kiuj iam ajn aperis en Esperanto. Kial? Samtempe gxi estas perfektiga kurso kaj gvidlibro tra la Esperanta kulturo.... Gxi estas tauxga por cxiu esperantisto, krom por vera komencanto. La libro estas uzebla kaj por kursoj, kaj por sola studanto. (Leif Nordenstorm - SVEDIO)

Mi forte rekomendis vian libron al kelkaj personoj en la kongreso kaj mi scias ke iu el ili ac'etis g'in. Mi mem denove uzos g'in en kursoj. Dum mia kurso sep personoj ac'etis g'in. Denove mi volas diri ke mi multe s'atas g'in. Sukceson al vi! (Kerstin Rohdin - SVEDIO)

Mi vidis hodiau vian novan libron, en CDELI - tre bele farita - kaj cetere laudita de Claude Gacond... kio devus signifi multon... (Andy Kuenzli - SVISLANDO)

Komencinta lernanto, deziranta plibonigi sian lingvonivelon, havas per tiu gvidlibro kaj perfektiga kurso tre indan ilon. Li ne bedauros sian elekton de tiu libro anstataux alia. (Roland Thibault - USONO)

Certe, lerni per tiu libro estas pli ol nur kurso. Tio estas mirinda vojaĝo tra la historio, literaturo, kaj vera kulturo de Esperanto-lando. (Phil Dorcas - USONO)

Se vi vere volas senti vin hejme en Esperantio, tiu cxi libro estas por vi. (Den Drown - USONO)

La redakta laboro spegulas la viglan, vervan personecon de la kompilinto, kun kiu mi konatig^{is} en 1993 en San-Francisko. (Reginald Jaderstrom - USONO)

Mi menciis cxi tie, ke la libro de s-ro Kolker estas la cxefa lernolibro por la 2-a kaj 3-a niveloj cxe la usona somera kursaro NASK (la "Nord-Amerika Somera Kursaro" de Esperanto). Ni elektis la libron pro gxia aktualeco (en gxi ecx trovigas informo, ke NASK nun okazas en Vermonto, ne en San-francisko!) kaj pro la ampleksa studo pri niaj historio, kulturo, kaj literaturo. (Lee Miller - USONO)

Nia malgranda E-grupo en Davis, CA jam ac^{etis} ekzempleron po unu de "Vojag^o". Kaj ni intencas uzi gⁱⁿ kiel bazon de dau^{ranta} studo de la lingvo. Mi jam legis multajn lecionojn en la libro kaj mi trovas gxin g^{uebla}. La libro enhavas multe da informpecoj, pri kiuj mi neniam antaue au^{dis} au ^{legis}. (Henry Studer - USONO)

Mi estas unu el la miloj da lernantoj de via libro "Vojagxo en Esperanto lando". Kun granda plezuro, mi entuziasme legis la unuajn pagxojn kaj decidis lerni la tutan libron, kune kun 9 aliaj esperantistoj. Ni formas studrondon nomitan laux via libro "Vojagxo en Esperanto lando" por kuna lernado. Nun ni estas studentaj la lecionon 14 (pli ol duonvojo). (Nguyen Xuan Thu - VJETNAMIO)

Kaj la tekstoj kaj la fotoj kovras la tutan historion de la lingvo de la tre malnova, gxis la plej aktuala. La kovrila foto, ekzemple, estas versxajne de la 86a UK en Zagrebo. Estas vere refresxige havi tiel gxisdatigitan libron en Esperanto... Mi finos per la jena konsilo. Se vi acetos nur unu Esperantlingvan libron cxi-jare, acetu tiun. Gxi ja estas kvazaux biblioteko en unu volumo. Se vi acetos multajn librojn cxi-jare, acetu de la auxtoroj, de kiuj Kolker cserpis, kaj poste acetu ekzempleron de "Vojagxo en Esperanto-Lando" por doni al amiko. (Thomas Alexander - USONO).

Novaj'oj

'Esperanto Britain Newsletter'

Pro diversaj kialoj, 'EAB NetNews' velkis post numero 16 en marto 2003. Tio lasis mankon en la provizado de aktualaj informoj anglalingve pri Esperanto por homoj en Britio. Post tiam mi aligxis al la Gxangalo-teamo, kiu provizas la plej grandan Esperantan retportalon siaspecan en la mondo, kun mil vizitoj tage, kaj kreskanta. (<<http://www.gxangalo.com>>)

NetNews estis multmaniere eksperimenta. Mi deziris scii kio okazus se iu lanxus priesplor-stilan novajxleteron pri Esperanto. Fakte mi trovis ke la NetNews-formulo kreis multe da intereso kaj entuziasmo. Gxi stimulis agadon en la popularigo de Esperanto, kaj en konektigxo kun la pli vasta mondo. NetNews estis la unua kiu vidis la signifon de la Nacia Strategio por Lingvoj, tiutempe diskutata en la parlamentejo. Ni prezentis plurajn raportojn pri la stato de lingvolernado en niaj lernejoj kaj la kultura konscio de multaj homoj en Britio. La nova Nacia Strategio por Lingvoj en Anglio nun malfermas al ni grandegan okazon reenkonduki la instruadon de Esperanto kiel lernejan temon, kaj ecx kiel enkondukan lernolingvon por stimuli la lernadon de aliaj lingvoj kaj kulturoj. La rezultoj de aktuala laborado tiurilate estas tre kuragxigaj. NetNews stimulis ankaux sxangxojn en la Esperanto-asocio. Esplor-stila novajxletero tamen bezonas iagradan sendependecon kaj distancon for de la asocioj. Necesas ankaux ke gxi atingu la publikon, ne nur la Esperantistojn. 'Esperanto Britain' (<<http://www.esperantobritain.com>>) lanxigxis pli frue cxijare por plenumi tiu mankon. Ni provizas integran informservon, kune kun la retportalo Gxangalo (en Esperanto), kaj kreskanta nombro da subportaloj. Gxisdate, tiuj inkluzivas 'Esperanto Brasil', 'Esperanto Espanol', 'Esperanto Araba', ecx subportalo por Esperanto muziko, 'Suca Kruco'. Mi tre deziras bonvenigi vin al 'Esperanto Britain'. Vi baldaux ricevos la unuan numeron de Esperanto Britain Newsletter, kiun vi nun povos ricevi tutsame kiel vi antauxe ricevadis NetNews. Permane teni aktuala retadresaron farigxas nun dauxre temporaba okupo, pro la oftaj retposxtaj sxangxoj por eviti troan trudposxton. Tiucele ni inkluzivas eblecon en la retpagxejo 'Esperanto Britain' por aligxi aux malaligxi al la novajxletero, kvankam tion ni povas ankaux fari permane se vi tion preferas. Cxu vi deziras ke mi registru vin en la retpagxejo por ke vi ricevu tiun cxi kompilajxon de la monata novajxo? Aux cxu vi preferus ensaluti cxe <<http://www.esperantobritain.com>> per rekonno kaj pasvorto, kaj registrigxi per alklako de la butono 'Newsletter'? Kiun ajn eblon vi elektas, gxuu la legadon ... kaj ja enrigardu la retpagxojn de tempo al tempo; necesas teni felicxaj la reklamantojn ;-)

Kore salutas Ian

Humoro

Anekdoto

En iu kompanio oni decidis varbi novajn laborantojn. Alvenis 200 kandidatoj, kiuj devis trapasi skriban ekzamenon. Unu el la demandoj estis: “Vi kondukas vian au’tomobilon en s’torma nokto. Vi preterpasas bushaltejon, en kiu staras 3 personoj atendantaj au’robuson. La unua estas maljunulino kiu aspektas preskau’ morta. La dua estas kuracisto, kiu foje savis vian vivon. La tria estas virino/viro pri kiu vi revis la tutan vivon. Vi rajtas preni kun vi nur unu el ili. Kiun vi elektos? Klarigu vian respondon”

La ekzameno estas kompreneble iu speco de “testo de personeco”: c’iu respondo kiun vi donos, lernigos ion pri via personeco. Vi certe povas malkovri kompatemon kaj elekti la maljunan sinjorinon, c’ar tiel vi eble sukcesos savi s’ian vivon. Au’ eble indas elekti la kuraciston, kiu ja savis vian vivon kaj nun vi havas la okazon rekompenci lin. Sed vi povas rekompenci lin ankaŭ estontece, dum vi havas la okazon trovi viab vivamat(in)on! Malfacilas elekti, c’u ne?

La kandidato kiu estis poste akceptita, elektis neniun el la supraj alternativoj. Li simple skribis: “Mi donos la s’losilojn de la au’to al la kuracisto, por ke li prenu la maljunan virinon al la malsanulejo. Mi restos tie kaj atentos la buson kun mia vir(in)o de la revoj”. C’u vi estas surprizitaj de lia respondo? Ne surprizig’u! La kandidato, kiu donis la specialan respondon, agis ekster la konataj limoj. Li transsaltis ilin kaj akiris la plejbonon.

(C’erpita el Israela Esperantisto, marte 2004)

El diplomlaboraj’oj de niaj gestudentoj

Vizitindaj’oj en Suda Albanio

(fragmentoj el diplomo de Faela Mezini)

3.1 Rajono de Vlora (pop. 72 000)

La ekzisto de tiu urbo komencig’as kun Aulono en pratempo , marborda urbo ilira. La nomon Vlora ricevis g’uste je la jaro 1081.

Vlora estas tre bela turisma urbo kaj la c’efa marhaveno de la Suda Albanio (fig.)

La plag’oj de la urbo etendig’as norde kaj sude de la marhaveno. La golfo de Vlora iras de la urbo de Vlora (oriente) g’is la kapo de Ghollovice (okcidente)

La bordo estas c’efe s’tonega kun malgrandaj plag’oj je s’tonetoj. La orienta parto estas sableca dum la centra surfaco estas kovrata je sablo kaj koto.

La Moskeo de Muradie (1538-1542)

Estas g’i moskeo kun kupolo, kie oni estas uzinta teknikon kaj konatajn elementojn en la enlanda arkitekturo el XI-XV jarcentoj. Temas pri la tekniko de konstruado per s’tonoj kaj brikoj de la eksteraj muroj (desegnita de fama turka arkitekto albandevena Mimar Sinani)

"La Monumento de Sendependig'o" (1972)- Estas bronza monumento, sur kies pinto staras la standardo tenita de distingitaj figuroj de la movado por la sendependig'o de Albanio.

Pro tiu monumento situanta en la centro de la urbo, mem la placo estas ricevinta la nomon "La Placo de sendependig'o".

(Memorigilo pri la Proklamig'o de Sendependa Albanio je 1912 jaro)

"La Muzeo de sendependig'o"- en g'i spegulig'as la severa batalo de albanoj por libereco kaj sendependeco, la okazintaj'oj alportintaj la starig'on de la standardo en Vlora je 28 an de novembro 1912 kiam Albanio estis proklamita sendependa s'tato.

"La Tombejo de martiroj"- supre de g'i estas alta obelisko. Estas ja tombejo de albanaj martiroj mortigitaj dum la Dua Mondmilito kontraŭ germanoj (1944 jaro).

"Kus Baba"- estas turismeca monteto, dominanta la urbon, ĉirkaŭita de olivarboj. G'i estas nomita alie kiel "La Balkono de Vlora" ĉar de tie videblas la tuta urbo.

Estas do mirakla loko por drinki bieron kaj g'ui la mirindan panoramon de la sunmallevig'o.

"La Preg'ejo de Sankta Marija" (XIV jarcento)- estas konstruaj'o je bizanca stilo. (G'i konservig'as en la insuleto de monah'ejo en la vilag'o Zvernec de Vlora).

Iliraj urboj

"La Kastelo de Janino" -estas en la samnoma vilag'o, 7 km for de Vlora. La arkeologiaj fosadoj (1971-1977) atestas ke kiel log'loko g'i ekzistas ekde la unua duono de la lasta miljaro antaŭ la nova erao.

La kastelo ampleksas surfacon je 3.625 ha kaj g'iaj muregoj havas 18 turoj. Ene de la kastelo oni estas malkovrinta ruinaĵ'ojn de log'ejoj, pavimitajn stratojn.

"La Ruinaĵ'oj de la urbo de Olimpia" (Mavrovo) - estas fondita dum la IV jarcento antaŭ Kristo en surfaco je 75 ha..

G'i etendig'as sur la deklivo de la monteto kaj havas linion je formo de segildentaro. G'ia planimetrio estas la sama al tiu de Finiq (saranda). La konstrutekniko estas same simila al la murstrukturo el plurangulaj kaj trapezoidaj blokoj.

"La ruinaĵ'oj de la urbo de Amantia" (Ploç)- je 35 km for de Vlora, fondita je la fino de V jarcento antaŭ la nova erao.. Lokita sur s'tonega ebenaj'o je surfaco 20 ha, g'i estas havinte fortifikita nur la akropolon je cirkonferenco 1 200 m kiu havis 3 enirejoj. Tiu murego estas realigita per la plurangula trekniko. Krom la ĉirkaŭigaj muregoj de akropolo, en g'i trovig'as ankaŭ: la stadiono de Amantia, la templo de Afroviti, la spuroj de teatro, nekropolo kun monumentecaj tomboj je formo de c'ambretoj kovritaj per plataj stonoj. Amantia menciitas kiel urbo ekde V jarcento kiel episkopeja centro. Tiutempaj

estas ankaŭ: murfragmento restau'rigita kaj ric'a baziliko je dekoriga arkitektonika plastiko.

" La Ruinaĵ'oj de la urbo de Orikumo" - VI jarcento antaŭ la nova erao-30 km for de Vlora. G'i troviĝas sur la konata monteto je nomo Paleokastro. El la antikvaj ruinaĵ'oj de la urbo estas konservitaj spuroj de log'ejoj kaj stratoj gravuritaj sur 'stonego. La plej grava monumento estas la teatro el I jarcento antaŭ la nova erao, por 500 spektantoj. En II jarcento de nova erao la urbo estis damaĝ'ita pro tertremego, estas rekonstruita kaj refortifigita dum V-VI jarcentoj. Apud g'i antaŭ XII jarcento estas konstruita La Kirko de Marmiroi, je tipo "kruco kun kupolo" , kiu hodiaŭ estas ruinigita. En g'ia silueto dominantas la alta tamburo cilindreca, karakteriza por la konstruaĵ'oj de la meza mezepoko.

La Kolo de "Llogara"

La alteco super la marnivelo estas 1027 m

La surfaco estas 1010 ha.

La Kolo de Llogara estas lokita sur marbordaj montoj sudokcidente de la golfo de Vlora, je 40 km for de g'i. Estas g'i turisma parko, je klimata aero ofertanta malfermitan kaj miraklan vidaj'on masupren en la virga marborda plag'o de Jonio.

La nacia Parko de Llogara estas tre kvietaj arbaro kun mirindaj pinarboj. Malsupre de logara troviĝas granda nombro de plag'oj kaj vilag'oj. G'i estas same ideala loko por la sportoj sub malfermita c'ielo.

"Palasa" estas la unua vilag'o, kun dislokig'intaj domoj kaj la plag'o c'e la piedoj de la monto abunde je sablo.

" Dhermi"- je 20 km for de Llogara, estas unu el la plej belaj vilag'oj de nia Riviero, konstruita inter la marbordo kaj la monto de Ĉika. Dhermi estas konata pro la g'ia pura maro. La plag'o estas tre bela , kun blanka sablo kaj s'tonegoj. Tie oni povas ekzerci la akvajn sportojn. Pro la sablo, maro kaj suno g'i reprezentas miraklan lokon.

En Dhermi troviĝas ankaŭ du praaj preg'ejoj el XII-XIV jarcentoj, la preg'ejo de Sankta Stefano kaj la Preg'ejo de Sankta Mitro.

"Vuno"- je 5 km for de Dhermi, tipa vilag'o en Riviero de Suda albanio, tre ensorc'iga kaj fascina kaj gastama kun malnovaj karakterizaj albanaj domoj.

"Himara"- je 10 km for de Vuno estas praa log'loko ilira el V jarcento antaŭ la nova erao. Kelkaj kilometroj sude, en malgranda insulo de la golfo troviĝas la Malgranda Kastelo de Ali Pasha Tepelena (XIX jarcento) c'irkau'ita de tipa mediteranea herbaro..

La plag'o de Himara estas mirinda.

"Qeparo"- je 15 km for de Himara; g'i situas sur monteto norde de g'i, je 400 m super la marnivelo troviĝas la Kastelo de Karos. Tiu kastelo estas ilira kun tri c'irkau'igaj muregoj kaj du antaŭdefendaj muregoj (komencig'o de la unua miljaro antaŭ la nova erao- IV jarcento antaŭ nova erao).

Qeparo konsistas el du vilag'oj: Malsupra Qeparo limigita de longa sabla, s'toneta plag'o kaj domaro el novaj kaj malnovaj miksite domoj.

La Supra Qeparo (bezonas c'irkau' duonhoron por grimpi sur g'in) per s'tonaj stratoj estas harmonieca arig'o de vilaoj kun rug'aj tegoloj, dividita per malvastaj stratetoj.

La vidaj'oj de la malsupra Qeparo kaj la maro de Korfu estas surprizigaj.

"Borsh" - je 40 km for de Saranda , estas same praa ilira vilag'o. En IV jarcento antau' la nova erao estis fondita la kastelo kiu dum mezepoko konatig'is je nomo " Kastelo de Sopoto" (hodiau' kultura monumento). La kastelo konsistas el muregoj je 3 m dikaj ellaboritaj per grandaj blokoj da s'tonoj kaj okupas surfacon je 5 ha.

La vilag'o de Borsh konatig'as pro la pura maro kaj aero.

"Pigeras kaj Lukova"- estas du turismecaj vilag'oj envicig'intaj tuj post Borsh, kies plag'oj estas je alta kvalito.

En Lukova trovig'as ilira kastelo el I-IV jarcentoj antau' la nova erao. La muregoj de la kastelo sekvas la terenon kaj fermigas la monteton de nordo kaj de okcidento. La orienta flanko kaj la suda flanko havas naturan protekton, La muregoj estas konstruitaj per la tekniko aplikata en Qeparo kaj Borsh. La dikeco de muregoj atingas 3-5 m.

" La insulo de Sazan"

Longeco 4.8 km

Larg'eco 2 km

Marborda linio 10 km

G'i havas formon de elipso kaj estas direktita Nordo-Nordokcidenten kaj sudo-sudorienten. La okcidenta flanko de la insulo estas karakterizita de altaj vertikalaj s'tonegoj, enig'intaj profunde en la maron , kun kanionoj kaj subakvaj grotoj. La kanionoj plej interesaj estas " La Kapo de Kolomboj" kaj " La Gorg'o de infero". La subakva medio havas fau'non kaj flau'ron multvariecan. La okcidenta parto de la insulo kaj la pasejo dividanta g'in de la duoninsulo de Karaburun estas tre bona por fis'kaptado.

3.2 Rajono de Sarande

Estas g'i malgranda urbo lokita inter la altaj montoj kaj Jonia Maro je 61 km sudokcidente de Gjirokaster.

La nomo Saranda devenas de praa preg'ejo-monah'ejo dedic'ita al "Santi quaranta" (40 sanktuloj).

Pro g'ia situo kaj varma klimato Saranda estas unu el la plej fascinaj allogaj urboj de Suda Albanio, kie aparte la geparoj s'atas pasigi ilian "mielan monaton". Saranda estas mirinda ripozloko kaj ege frekventata de turistoj. La stratoj lau'longe de la marbordo estas plenplenaj je palmoj kaj hoteloj. La marbordo de Saranda estas ideala por akvaj sportoj kaj ofertas eblecojn por fis'kapatada sporto.

" La Kristana Baziliko" el V-VI jarcentoj- En la ruinaj'oj de tiu baziliko tre valora trovig'as la planko plena je belaj multkoloraj mozaikoj.

" **La ruinaj'oj de la Preg'ejo-Monah'ejo**" de " 40 sanktuloj" estas alia vidindaj'o. De tiu baziliko ja nomig'is ankau' la urbo mem.

" **La Historia Muzeo**"- enhavas aron de multaj objektoj uzitaj kaj utiligitaj de praaj iliraj log'antoj de Butrinto, ka.

"**Finiq**"- estas praa log'loko el V jarcento antau' la nova erao. La urbo havis surfacon je 75 ha kie apartig'is la agorao lokita surdorse de la monteto kun videbleco al la maro kaj insulo de Korfu. Agorao dividig'is per muro, de la cetera areo log'ata de la urbo Butrinto (IV jarcento antau' la nova erao). La fortifikaj'o etendig'is sur la deklivon de la monteto kun defendmuroj je formo de segidentaro. Agorao havis malgrandan surfacon je 5.5 ha kaj la urbo havis 5 pordegoj.

"**Butrinto**"-tien kondukas pitoreska vojo vidanta al la maro, trapasanta inter olivarboj kaj orang'arboj . Butrinto estas praa urbo de Epiro lokita sur monteto de la duoninsulo de Ksamil, c'eborde de la lago, 15 km sude de saranda.

G'i nomig'is tiel pro la mortigita virbovo Buthrotos kiun la princo Aeneas de Troja estis oferinta okaze de lia eniro en Epiro. G'i estis log'loko de iliraj gentoj (VI jarcento antau' Kristo) kaj poste sekvis la sorton de Romia Imperio kaj tiu Bizanca, kaj ancorau' poste falis sub la jugon de Ali Pasha Tepelena.

Inter la ruinaj'oj la plej interesaj je arkeologia vidpunkto estas:

"**La c'irkau'igaj muregoj de la urbo**" (VI jarcento antau' Kristo) konstruitaj je plurangula stilo, descendantaj al iliaj pordegoj g'is la lagobordo de Butrinto.

"**La Pordego kun Turoj**"- III jarcento antau' Kristo

"**La Cefa Pordego**", " Skea" (je vidaj'o al la lago)

"**La Pordegode la Leono**"- g'i nomig'is tiel c'ar en g'i trovig'as majesta gravuraj'o de leono mang'anta la kapon de virbovo (simboleca por la protektiga forto venkanta sur la atakantoj).

"**La Portiko**"- estis ja la loko kie log'ig'is la malsanuloj.

"**Jeatri**"- II jarcento antau' Kristo en kies muroj estas gravuritaj dekoj da surskriboj (c'irkau' 1500). Estis uzita ankau' dum la romia periodo (II jarcento antau' Kristo) kaj subig'is al radikala rekonstruado.

"**Gimnazio**"- I jarcento antau' Kristo- estis domo kie oni edukis la infanojn kaj la junulojn.

"**Publikaj Banejoj**"- I jarcento antau' Kristo- je geometria mozaikoj kaj la piedoj de akvokondukilo.

"**Nymfeo**"- I jarcento antau' Kristo.

"**La Templo de Eskulapo**"- estas starigita sur romia betona strukturo (dedic'ita al Eskulapo- dio de sano)

"**Trikonka**"- tiu monumento estas kvalifikta komence kiel preg'ejo. La arkeologiaj fosadoj atestis ke g'i reprezentis ceremoniecan au'lon c'e la enirejo de granda palaco kiu probable apartenis al alta personeco de Butrinto (VI-VII jarcento antau' la nova erao) .Tia personeco povus esti ekzemple la episkopo. La enirejo de Trikonka malfermig'is tra koridoro.

"**Baptisfero**"- grava monumento el la , paleokristana periodo je la fino de VI jarcento de nova erao.

G'i konsistas el bapta au'lo kaj helpau'lo, ambau' pavimitaj je mozaikoj. La unua au'lo estas rondforma je diametro 13,50 m enskribita en kvadraton kun du cirkloj da granitaj kolonoj. G'i estas dekorigita per multkoloraj mozaikoj kun bestoj kaj birdoj, je apartaj artismaj valoroj.

"Baziliko"- estas monumento ekde paleokristana periodo en VI jarcento de nova erao. G'i troviĝas apud la Pordego kun Turoj je nordorienta flanko de Butrinto. Estas g'i baziliko kun dividita tramscepto en tri anijatoj per arkadoj sur pilastroj. La murstrukturo estas konstruita el s'tonoj, dum la arkaj kovraĵoj de la fenestroj per brikoj. El g'i estas plene konservitaj la c'irkau'igaj muregoj kaj la planko pavimita per s'tonaj platoj.

"La Kastelo de Ali Pasha Tepelena" -(XIX jarcento)- g'i kune kun la vico de turoj estas unu el plej malfruaj monumentoj konservitaj de la antikva urbo de Butrinto. G'i estas triangula fortreso konstruita de la reg'o de militoj Ali Pasha Tepelena, konsistanta el du turoj starigitaj en ambau' flankoj de la lago de Butrinto (fig.)

" La Muzeo de Butrinto"- ene de g'i troviĝas multaj statuoj kaj skulptaĵoj ekde la praa romia kaj bizanca tempo.

" Ksamilo"- estas insuleto tre bela turismeca iom pli fore ol Butrinto. Ekde la pratempo g'i estis kvalifikita kiel la perlo de Albanio, c'irkau'ita de olivarboj apud la lago de Butrinto unuflanke kaj maro aliflanke. La insulo estas aprecita pro ekologiaj valoroj c'ar enhavas raran faŭnon kaj flau'ron.

"La Blua Okulo" kaj ties legendo.

Estas ja magika loko multe vizitata, je 18 km norde de la urbo de Saranda. Estas g'i kvieta kaj agrabla loko, ombrig'inta de tre praa jarcentaj kverkoarboj. Lau' legendo dekdukapa drakono savis j'aluzece helan kaj fres'an akvofonton , forigante de g'i la log'antojn c'irkau'e.

3.3 Rajono de Gjirokaster

Estas malnova bela urbo, je praa historio, kun domoj konstruitaj ekde la tempo de osmanoj (estas kvalifikita kiel urbo-muzeo).

"La preg'ejo de Sopik" -000XVII jarcento, estas domo de kristana kulto.

" La Moskeo de Bazaro"- 1757 jaro- moskeo kun kupolo, je tipo monumenteca de islama arkitekturo.

" La Moskeo Mecate"- la restaĵoj de tiu moskeo kaj la Turkaj banejoj (hamamoj) el XVII jarcento troviĝas ie apud hotelo "Çajupi" en la urbo.

"Monument Mammoth ABC"- estas memorigilo pri la renaskig'o de albana klerigado dum jarcentoj, ekde tie oni povas g'ui miraklan vidaj'on de la urbo.

La kvartaloj kun domoj je grandaj arkitektonikaj kaj artismaj valoroj

" La Kvartalo Malnova Bazaro" kaj la Kvartalo" Hazmurat" lokitaj sur du krestoj paralelaj unu al la alia estas lokoj kie estas plejmulte konstruitaj karakterizaj domoj de la urbo.

La nuna bazaro je la centro de la urbo estas konstruita dum XVII jarcento. G'i estis bruligita je la mezo de XIX jarcento kaj rekonstruita tute per skulptitaj s'tonoj adaptigitaj al la naturo de domoj.

" La kvartalo Palorto" kaj La Kvartalo " Manalat" estas etendig'antaj oblikve kaj konsistas el monumentecaj krakterizaj domoj, kun distigeblaj volumoj kaj homogenaj blokoj.

La Kvartalo " Dunavat"- g'iaj domoj estas majstrece ligitaj kun tiuj de kvartaloj " Palorto" kaj " Manalat".

La kvartalo " Cfaka"- la formoj de la domoj de tiu kvartalo estas traktitaj pli libere kaj harmonie kun la verdeco.

La Karakterizaj Domoj de Gjirokaster

La domoj de tiuj kvartaloj estas trairintaj longan vojon de evoluo kaj aperas en tri c'efaj variantoj:

La ekstera aspekto kunigas la severecon kun graciecon de la fenestroj, c'ardakoj, malpezaj kolonoj por la larg'aj tegmentvizieroj kaj foje kun pentraj'oj sub ili. En multaj kazoj la internaj medioj havas laboraj'oj je lignogravuraj'oj.

C'iu log'ejoj havas la formon de mezepokaj nobelturoj konstruitaj c'e unu la alia kaj komunan elementon- s'tonon, kiu estis ellaborita de majstroj, konforme al la c'irkau'a medio.

"La Kastelo de Gjirokaster"- XIV jarcento- estas unu el la plej majestaj kasteloj bone konservitaj en Suda Albanio. G'i havas tri c'efaj enirejoj kaj malgrandan enirejon. G'i estas defendebla de 7 turoj atingantaj g'is 30 m je alteco, en la supra parto kun 1-2 etag'oj kaj kun grandaj au'loj. Preskau' la duono de la kastelo estas kovrita per plata s'tono kaj estas havinta multajn ejojn kaj subterajn deponejojn. La interna parto de la kastelo estas konstruita per granda kapableco je militista vidpunkto kiel ekzemple la elirejoj el la pordegoj tra tuneloj.

Dum 1920 jaro la fortreso estis transformita en prizanon kaj nazioj same uzis g'in tia dum ilia restado 1943-1944.

" La Nacia Muzeo de Armiloj" trovig'as ene de la kastelo de Gjirokaster, en la grandaj au'loj de la c'efa enirejo. Tiu muzeo enhavas c'iujn specojn de la armiloj , produktitaj kaj uzitaj de Albanio pratempe.G'i same estas kolekcio de malnovaj kanonoj kaj aeroplano dusidloka de Usono haltigita en Albanio en la jaro 1957.

" La Etnografia Muzeo"- tiu muzeo donas la eblecon por vidi de interne la malnovajn domojn de Gjirokaster konstruitaj en la jaro 1820. La gastoc'ambro en tiu domo , kiu komence apartenis al la familio Skenduli, havas plafonon kun gravuraj'oj, kamenon dekorigitan kaj ornamitan , samkiel aliajn ekipaj'ojn de la c'ambro, sofon kaj tapis'ojn.

"Antigonea"- III jarcento antau' la nova erao.- praa urbo en Epiro sur la ruinaj'oj de la kastelo de Jerma (apud Gjirokaster).

G'i estis konstruita sur la ebenaj'o de monteto je alteco 700 m super la marnivelo kaj okupas surfacon je 45 ha.

La c'irkau'igaj muregoj realigitaj per la tekniko tipa al Suda Ilirio estas longaj c'irkau' 2000 m kaj larg'aj 3.5 m, konistas el s'tonblokoj rektangulaj kaj plurangulaj, plifortigitaj per 13 rektangulaj turoj kaj havas tri pordegoj. La domoj de tiu praa urbo estis de stilo peristil.

Estas trovita ankaŭ malgranda trikonko el VI jarcento, je planko kun multkoloraj mozaikoj.

" La Fonto de Viroi" - estas kvietaj loko kun mirakla pejzag'o, c'irkau'ita de montoj kaj arboj. Estas tau'ga loko por ripozi.